

PROPONO DE KRITERIOJ POR LA ESPERANTIGO DE LA BRAZILAJ ŜTATO- KAJ URBO-NOMOJ

Tulio Flores

Nuna versio: 11/08/2021 (LASTA VERSIO)

Antaŭa versio: 28/04/2021

Unua versio: 27/12/2013

ENHAVO

| | Paĝo |
|-------------------------|------|
| 1. Ĝeneralaj klarigoj | 1 |
| 2. Kriterioj | 9 |
| 3. Ŝtatoj de Brazilo | 23 |
| 4. Municipoj de Brazilo | 27 |

1. ĜENERALAJ KLARIGOJ

Brazilo estas dividita en 26 ŝtatoj (aŭ federaciaj unuoj) kaj unu federacia distrikto (kie situas la ĉefurbo Braziljo), kaj havas 5.570 municipojn. En ĉi tiu laboraĵo mi montras la kriteriojn (aŭ regulojn), kiujn mi deduktis por la esperantigo de tiuj ŝtato- kaj urbo-nomoj.

La unuan provon sisteme esperantigi la brazilajn geografiajn nomojn supozeble faris s-ro Délio Pereira de Souza per la verketo *Brazilaj Geografiaj Nomoj*, eldonita en 1981. Tie li montras la esperantigon de la nomoj de kelkaj urboj, riveroj, montoj k.a., sed la nurajn kriteriojn, kiujn li eksplicite mencias estas la aldono de *-o* al oksitonaj nomoj kaj ŝanĝo de la vortfinaĵoj al *-o* en la neoksitonaj. Pri la ceteraj partoj de la nomoj oni povas nur konjekti, kiun sistemon li uzis, ĉar ili ne estis konsekvence esperantigitaj.

Demando, kiun eble oni povas fari pri la temo estas: ĉu fakte oni bezonas esperantigi **ĉiujn** urbonomojn, eĉ tiujn de malgrandaj, internacie nekonataj urbetoj? Mia emfaza respondo estas: *Jes!* Ne gvidis min la fakto, ke la urbo estas granda aŭ malgranda, grava aŭ malgrava, signifa aŭ sensignifa. Laŭ mi, ĉiuj urboj estas gravaj kaj plensignifaj, sendepende de tio, ke en tiu aŭ tiu alia loĝas milionoj aŭ kelkmilo da homoj. Gravas, en ĉi tiu laboro, **trovi la regulojn por la esperantigo**. Tiel ni havos **klare difinitajn kriteriojn** por esperantigi ĉiujn aliajn nomojn necesajn por la brazila esperantistaro, kaj eble ankaŭ por aliaj landoj. Ĉar la laboro estas tro granda, ol ke mi povus fari ĝin je unu fojo, mi limigis mian kampon al la nomoj de la ŝtatoj kaj municipoj de Brazilo. Se ĉi tiu laboraĵo ricevos la aprobon de la brazila esperantistaro, oni povos apliki ĝin al la ceteraj geografiaĵoj (biomoj, riveroj, riveretoj, lagoj, montoj, kvartaloj ktp.). Ankaŭ la ĝeneralaj vortoj de la brazila kulturo, historio, folkloro ktp. povos profiti el ĝi. Sed la esperantigo de ĉi tiuj ĝeneralaj vortoj estas iom pli komplika ol la simpla transskribado, kiel okazas ĉe la urbonomoj. Tial mi lasos ĉi tiun laboron por posta etapo.

La plej ĝenerala sistemo por esperantigi fremdajn nomojn estas la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko. Ĝi tekstas: “La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo,

ricevante nur la ortografion de ĉi tiu lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi sensanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.” (El *Fundamenta Krestomatio*, 18-a eldono, paĝo 241).

Por apliki ĉi tiun regulon, estas necese scii, kiel la diversaj lingvoj nomas la brazilajn urbojn. Eble la plej internacie konata brazila urbo estas **Rio de Janeiro**. Se ni esploros, kiel la diversaj lingvoj de la mondo traktas tiun nomon, ni vidos, ekzemple en la diverslingvaj versioj de Vikipedio – <http://eo.wikipedia.org/> –, ke preskaŭ ĉiuj lingvoj, kiuj uzas la latinan alfabeton uzas la nomon sensanĝe, sed prononcas ĝin laŭ siaj apartaj prononcaj reguloj. Inter tiuj lingvoj, aparte interesaj por mia celo estas la lingvoj litova kaj latva, ĉar, kvankam ili uzas la latinan alfabeton, ili regule skribas la fremdajn nomojn laŭ la ortografio de ĉi tiuj lingvoj. En la litova ĝi estas **Rio de Žaneiras** kaj en la latva – **Riodežaneiro**. Alia lingvo, kiu estas utila en tiu esplorado estas la rusa lingvo, ĉar ĝi uzas alian alfabeton (la cirilan) kaj tial ĝi devas ĉiujn fremdajn nomojn skribi per ĉi tiu alfabeto. La citita urbonomo, en la rusa lingvo, estas skribata **Рио-де-Жанейро**. Krome, konsultante la rusan Vikipedion, mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj brazilaj urboj jam havas siajn nomojn skribitajn per la cirila alfabeto. Tial en la subaj tabeloj (paĝoj 23–25 kaj 27–282) mi informas en la kolumno *Transliterado* la rusan nomon de la ŝtatoj aŭ urboj, kune kun la esperantalfabeta prezento de la proksimuma prononco. Ankaŭ la kelkaj litovaj kaj latvaj nomoj, kiujn mi trovis estas montrataj en tiu kolumno. Pro mia nesufiĉa kono de aliaj alfabetoj kaj skribsistemoj, mi ne povis kompari la solvon de la lingvoj ĉina, japana, araba, korea k.a. Krom la fakto, ke tre malmultajn nomojn mi trovis transskribitajn al ĉi tiuj skribsistemoj.

La esperantigo de propraj nomoj povas baziĝi sur tri sistemoj: la grafisma, la fonetisma kaj la semantika. En la grafisma sistemo, oni konservas laŭeble la samajn literojn de la origina nomo, sed prononcas ilin laŭ la Esperanta maniero. La nomo de la ŝtato **Ceará**, ekzemple, fariĝus *Ceara*’ [tsea’ra]. En la fonetisma sistemo, oni provas prezenti la prononcon de la nomo uzante la Esperantan alfabeton. La sama ŝtatonomo fariĝus *Seara*’ [sea’ra] aŭ [sia’ra]. En la semantika sistemo, oni tradukas la nomon al ekvivalenta Esperanta nomo. La sama ŝtatonomo signifus en la brazilportugala lingvo **canto da jandaia**, laŭ unu el la versioj, t.e. *kanto de la araeto* (el indiĝena vorto *cego* (forte kanti) kaj *ara* (malgranda arao) (Fonto: <http://pt.wikipedia.org> - artikolo **Ceará**). En ĉi tiu laboraĵo mi baziĝis ĉefe sur la fonetisma sistemo, kun ioma rigardo al la grafisma (vidu ekzemple la kriterion 49), kaj, en maloftaj okazoj, al la semantika (vidu ekzemple la kriteriojn 72, 61, 93 k.a.).

Do la baza principo, kiun mi sekvis en ĉi tiu laboraĵo estas la *prononco* de la nomoj kaj ĝia laŭebla prezento per la Esperanta alfabeto, kun uzo de la substantiva finaĵo *o*. Tamen, por prezenti brazilan nomon per la Esperanta alfabeto, mi devis el ĉiu aparta nomo dedukti la kriteriojn aŭ regulojn, kiujn mi uzos, kaj kiuj taŭgos por ĉiu alia simila nomo, tiel ke ĝi povos esti uzata en ĉiuj estontaj okazoj, se oni nur sekvos la kriteriojn.

Por dedukti tiujn kriteriojn, mi elektis, el la 5.570 municipoj de Brazilo, tiujn 1.000 municipojn, kiuj estas pli gravaj, ĉu pro la nombro de loĝantoj, ĉu pro ilia proksimeco al iu el la grandaj urboj.

Pro la granda diverseco de la nomoj kaj la specifaĵoj de la portugala lingvo, mi venis al 112 kriterioj. Kiam necese, mi aldonis al la kriterioj rimarkojn, per kiuj mi donas pliajn informojn pri la kriterio.

Nun mi klarigu pli detale mian labormetodon.

Kiel menciite, mi elektis 1.000 municipojn por komenci la laboron. Ĉiujn tiujn nomojn mi laŭtlegis kaj provis skribi ilin per la Esperanta alfabeto. Tiel mi deduktis la kriteriojn, kiujn mi nun prezentas al vi.

Alia afero, kiu gvidis min estis la klopodo ne ŝanĝi la akcentan silabon de la nomoj. Tiel la esperantigita nomo similos la originalan ne nur skribe, sed ankaŭ sone. Tio estas facile farebla rilate la oksitonajn kaj paroksitonajn nomojn. La unuaj solviĝas per aldono de la substantiva finaĵo *-o* (ekz.: **Barueri** – *Baruerio*); la duaj, per la anstataŭigo de la fina vokalo (aŭ silaboparto) per *-o* (ekz.: **Fortaleza** – *Fortalezao*; *Alfenas* – *Alfeno*). Sed la proparoksitonajn nomojn mi devis ŝanĝi al paroksitonaj (ekz.: **Alcântara** – *Alkantaro*), pro la paroksitoneco de Esperanto.

En la sekvo mi komentos kelkajn punktojn, kiujn mi frontis dum la esplorado.

Uzo de streketoj ĉe plurelementaj nomoj

Multaj el la nomoj havas pli ol unu vorton (ekzemple: **Rio de Janeiro, São Paulo, Rio Grande do Norte, São José dos Campos, São Bernardo do Campo, Governador Valadares, Cachoeiro de Itapemirim, Vila Bela da Santíssima Trindade**). Kompreneble oni ne povas uzi tiujn vortojn aparte, ĉar tiel ili ne formus taŭgajn nomojn por la derivado de adjektivoj kaj loĝantonomoj. Tamen, se oni skribus ilin en unu sola vorto, ili riskus fariĝi preskaŭ nedeĉifreblaj: *Riodejanejro, Sanpaŭlo, Riograndedonorto, Sanĵozedokampo, Sanbernardodokampo, Governadorvaladaro, Kaŝoejrodeitapemirino, Vilabeladasantisimatrindado*. Tial mi preferis uzi dividstreketojn inter ĉiuj elementoj de la nomoj: *Rio-de-Janejro, San-Paŭlo, Rio-Grande-do-Norto, San-Joze-dos-Kampo, San-Bernardo-do-Kampo, Governador-Valadaro, Kaŝoejro-de-Itapemirino, Vila-Bela-da-Santisima-Trindado*.

Unu loko, pluraj nomoj

Ofte okazas, ke urbo havas unu oficialan, plurelementan nomon, kiu estas uzata en dokumentoj, poŝtaĵoj k.t.p., kaj alian pli malgrandan nomon, kiu estas uzata de la loĝantoj en la ĉiutaga vivo aŭ en neformalaj okazoj. Ekzemple, la urbo **São João del-Rei** (*San-Joan-del-Rejo*) estas neformale nomata de siaj loĝantoj nur **São João** (*San-Joano*). En tiuj okazoj, kiam mi scias, ke mallonga formo estas uzata, mi esperantigis ambaŭ formojn. Alia konata ekzemplo estas **Rio de Janeiro** (*Rio-de-Janejro*), kiun la loĝantoj – kaj ne nur ili! – ofte nomas nur **Rio** (*Rio*).

En aliaj okazoj, kelkaj urboj havas ankaŭ t.n. *karesan* nomon, kiu estas simpligita formo de la oficiala nomo. Ekzemple, la urbo **São Paulo** (*San-Paŭlo*) estas nomata ankaŭ **Sampa** (*Sampo*). Kaj **Florianópolis** (*Florianopolo*) estas nomata **Floripa** (*Floripo*).

Urbonomojn oni ne traduku, sed asimilu

Kion signifas la vortoj *Parizo, Londono* kaj *Moskvo*? Trovi ilian signifon estas tre malfacile, se entute eble. La samo okazas rilate la brazilajn urbonomojn (kaj ankaŭ la ŝtatonomojn). La signifo de la nomo de la fama urbo **Rio de Janeiro** estas *Rivero de Januaro*, sed la fakto, ke ĝi estas facile tradukebla ne signifas, ke oni traduku ĝin. Oni simple adaptu ĝin al la Esperanta ortografio (laŭ la 15-a regulo de la Fundamento). Same erare estus esperantigi la ŝtatonomojn **São Paulo** kaj **Santa Catarina** per *Sankta Paŭlo* aŭ *Sankta Katarino* aŭ la urbonomon **Belo Horizonte** per *Bela Horizonto*. Tiujn nomojn oni adaptu laŭ la prononco kaj tial ili fariĝas *Rio-de-Janejro, San-Paŭlo, Santa-Katarino* kaj *Belo-Horizonto* (pri ĉi tiu lasta legu iom sube pri la uzo de la litero *h*).

Kompreneble tio ne signifas, ke en iu okazo oni ne klarigu la signifon de iu nomo, se oni konas ĝin. Ekzemple, la urbonomo **Taguatinga** povas havi la signifon “blanka

birdo”, sed por esperantigi la nomon, oni prefere uzu *Tagvatingo*, el kiu oni povas havi la adjektivon *tagvatinga* kaj la loĝantonomon *tagvatingano*.

Rilate la literon “h”

En la portugala lingvo la litero **h** ne estas prononcata. Tial en la komenco de mia esplorado mi ordinare ignoris ĝin en la transskribado de la nomoj. La urbonomo **Belo Horizonte**, ekzemple, devus esti transskribata *Belo-Orizonto*, same kiel faras la lingvoj rusa (Белу-Оризонти – Belu-Orizonti) kaj la latva (Belu Orizonti). Tamen en la ŝtato Suda Rio-Grando (aŭ Rio-Grande-do-Sulo), pro influo de la germanaj enmigrintoj, almenaŭ unu urbo (**Nova Hartz**) havas nomon, en kiu la **h** estas prononcata. Diskutinte la temon kun kelkaj brazilaj esperantistoj, mi venis al la konkludo, ke en la okazoj, en kiuj la litero **h** estas la unua litero de la vorto, estas preferinde restigi ĝin, farante kompromison kun la grafisma sistemo. Sekve urbonomoj kiel **Belo Horizonte**, **Novo Hamburgo**, **Hortolândia** fariĝis *Belo-Orizonto*, *Novo-Hamburgo*, *Hortolando*.

Pri unu punkto tamen, mi konservas mian opinion, ke oni ne transkribu la **h**: temas, kiam ĝi estas ene de la vorto kaj havas nenian prononcan motivon ekzisti. Pro tiu motivo nomoj kiel **Bahia** kaj **Piumhi** fariĝis *Baio* kaj *Piumio*. Eĉ en la portugala lingvo tiu **h** ne estas pravigebla kaj oni devus skribi **Baía** (same kiel en la loĝantonomo **baiano**) kaj **Piúí** (en la ĉi-lasta la **u** havas nazalan sonon [piúí], same kiel en la vorto **multo**).

La silaboj **gua**, **gue** (= **güe**), **gui** (= **güi**), **guo**, **qua**, **que** (= **qüe**), **qui** (= **qüi**), **quo**

Sekvante la Esperantan tradicion, mi transskribas tiujn silabojn al *gva*, *gve*, *gvi*, *gvo*, *kva*, *kve*, *kvi*, *kvo*. Interese, ke en la rusaj transskriboj mi trovis *гва*, *гуи*, *кya* anstataŭ la atendataj *гва*, *гви*, *ква*. Ekzemple: **Guarapari** (*Gvarapario*, Гуарапари), **Birigui** (= **güi**) (*Birigvio*, Биригуи), **Itaquaquecetuba** (*Itakvakesetubo*, Итакуакесетуба).

En du aliaj okazoj (en **Santo Antônio de Pádua** kaj **Nova Pádua**) mi uzis similan solvon. La vorton **Pádua** mi transkribis per *Padvo* (kriterio 105), anstataŭ uzi la Esperantan nomon *Padovo*. Cetere tiu itala urbo estas nomata en la pola lingvo *Padwa*.

La diftongo “ou”

Kvankam kelkaj esperantistoj opinias, ke la silabo “ou” ne estas propre Esperanta, mi tamen uzis ĝin, ĉar mi vidas nenian problemon en ĝia uzado por transskribi fremdajn nomojn, kiaj estas tiuj geografiaĵoj. Mi eĉ kredas, ke tio riĉigas la Esperantan sonaron, same kiel estus la uzado de “*güa*”, “*küa*” kaj similaj.

Sekvi la prononcon, sed ĝis certaj limoj

Uzado de la fonetisma sistemo por esperantigi la nomojn, ne signifas, ke oni blinde sekvu ĝin. En granda parto de Brazilo la silaboj **de** kaj **di**, **te** kaj **ti** estas en kelkaj vortoj pronocataj respektive *ĝi* kaj *ĉi* (aŭ eĉ *ĝ* kaj *ĉ*!): **tarde** [*tárĝi*, aŭ *tarĝ*], **dia** [*ĝia*], **leite** [*léjĉi* aŭ *lejĉ*]. Io simila okazas al la senakcenta vokalo **o**, kiu estas kelkfoje prononcata *u*: **pato** [*pátu*]. En tiuj okazoj mi preferis konservi la originajn literojn, por ke la vorto ne tro diferencu de la origina skribo. Des pli, ke multaj brazilanoj ja prononcas tiujn sonojn same kiel en Esperanto.

Aliflanke, la esperantigita nomo ne havu sonojn neekzistantajn en la brazila prononco. Tial la silabojn **ce** kaj **ci** mi transskribas al *se* kaj *si*, ĉar la Esperanta sono *c* [ts] ne apartenas al la brazila sonaro, krom en fremdaj vortoj kiel *pizza*, *best seller*. Sekve, nomoj kiel **Recife** kaj **Ceará** fariĝas *Resifo* kaj *Searao*. Simile pri la sono de *h*, kiun kelkaj volas atribui al la komenca **r** aŭ al la duobla **rr**. Ili estas malsamaj sonoj. Kaj **r** kaj **rr** mi transskribas per nura *r*: **Serra** – *Sero*, **Rio** – *Rio*.

Majuskligo de la nomoj

Kiam la nomo estas plurelementa, oni majuskligas la komencan literon de ĉiuj elementoj, krom de la partikuloj (prepozicioj, konjunkcioj ktp.): **Rio de Janeiro** – *Rio-de-Ĵanejro*, **São João del-Rei** – *San-Ĵoan-del-Rejo*, **Abreu e Lima** – *Abreŭ-e-Limo*. Escepto al tiu regulo estas, kiam la partikulo estas ligita al alia nomo per apostrofo kaj en la transskribo tiu apostrofo forfalas: **Santa Bárbara d'Oeste** – *Santa-Barbara-Doesto*.

En la derivitaj formoj (adjektivo kaj loĝantonomo), mi proponas, ke oni uzu ordinare minusklojn, escepte se aliaj kaŭzoj postulas majusklojn, ekzemple en la komenco de frazoj, titoloj k.a.

La antaŭaj transskriboj

Ĉar ĝis hodiaŭ ne ekzistis difinita kaj klare formulita sistemo por esperantigi la brazilajn nomojn, dum la pasintaj jaroj amasiĝis plej diversaj versioj de tiuj nomoj. Ekzemple, por la nomo **Rio de Janeiro**, oni trovas almenaŭ naŭ versiojn: *Rio-de-Ĵanejro*, *Riodeĵanejro*, *Rio de Ĵanejro*, *Rio-Ĵanero*, *Rioĵanero*, *Rio-Ĵanejro*, *Rio-de-Janejro*, *Rio-dejanejro*, *Rio de Janejro* (A. Cherpillod, *Nepivaj vortoj*, dua eldono, pĝ. 4). Eble en la komenco oni hezitos antaŭ la novaj nomoj ĉi tie proponataj por aliaj geografiaĵoj, sed oni bonvolu rigardi ilin, kiel provojn por klare difini la kriteriojn por esperantigo de la brazilaj nomoj. Jen kelkaj el tiuj proponoj:

ŜTATOJ: **Acre** – *Akro*, **Alagoas** – *Alagoo*, **Amapá** – *Amapao*, **Amazonas** – *Amazono*, **Bahia** – *Baio*, **Ceará** – *Searao*, **Distrito Federal** – *Federacia Distrikto*, **Espírito Santo** – *Espirito-Santo*, **Goiás** – *Gojaso*, **Maranhão** – *Maranjano*, **Mato Grosso** – *Mato-Groso*, **Mato Grosso do Sul** – *Suda Mato-Groso*, **Minas Gerais** (aŭ **Minas**) – *Minas-Ĵerajso* (aŭ *Mino*), **Pará** – *Parao*, **Paraíba** – *Paraibo*, **Paraná** – *Paranao*, **Pernambuco** – *Pernambuko*, **Piauí** – *Piaŭio*, **Rio de Janeiro** – *Rio-de-Ĵanejro*, **Rio Grande do Norte** – *Norda Rio-Grando*, **Rio Grande do Sul** – *Suda Rio-Grando*, **Rondônia** – *Rondonjo*, **Roraima** – *Rorajmo*, **Santa Catarina** – *Santa-Katarino*, **São Paulo** – *San-Paŭlo*, **Sergipe** – *Serĵipo*, **Tocantins** – *Tokantins*.

ŜTATAJ ĈEFURBOJ: **Aracaju** (SE) – *Arakaĵuo*, **Belém** (PA) – *Beleno*, **Belo Horizonte** (MG) – *Belo-Horizonto*, **Boa Vista** (RR) – *Boa-Visto*, **Brasília** (DF) – *Braziljo*, **Campo Grande** (MS) – *Kampo-Grando*, **Cuiabá** (MT) – *Kujabao*, **Curitiba** (PR) – *Kuritibo*, **Florianópolis** (SC) – *Florianopolo*, **Fortaleza** (CE) – *Fortaleza*, **Goiânia** (GO) – *Gojanjo*, **João Pessoa** (PB) – *Ĵoan-Pesoo*, **Macapá** (AP) – *Makapao*, **Maceió** (AL) – *Masejoo*, **Manaus** (AM) – *Manaŭso*, **Natal** (RN) – *Natalo*, **Palmas** (TO) – *Palmo*, **Porto Alegre** (RS) – *Porto-Alegro*, **Porto Velho** (RO) – *Porto-Veljo*, **Recife** (PE) – *Resifo*, **Rio Branco** (AC) – *Rio-Branko*, **Rio de Janeiro** (aŭ **Rio**) (RJ) – *Rio-de-Ĵanejro* (aŭ *Rio*), **Salvador** (BA) – *Salvadoro*, **São Luís** (MA) – *San-Luiso*, **São Paulo** (SP) – *San-Paŭlo*, **Teresina** (PI) – *Terezino*, **Vitória** (ES) – *Vitorjo*.

ALIAJ URBOJ: **Alto Paraíso de Goiás** (aŭ **Alto Paraíso**) (GO) – *Alto-Paraizo-de-Gojaso* (aŭ *Alto-Paraizo*), **Aragarças** (GO) – *Aragarso*, **Barbacena** (MG) – *Barbaseno*, **Barra do Garças** (MT) – *Bara-do-Garso*, **Barra Mansa** (RJ) – *Bara-Manso*, **Barretos** (SP) – *Bareto*, **Bauru** (SP) – *Baŭruo*, **Betim** (MG) – *Betino*, **Campina Grande** (PB) – *Kampina-Grando*, **Campinas** (SP) – *Kampino*, **Cascavel** (PR kaj CE) – *Kaskavelo*, **Chapecó** (SC) – *Ŝapekoo*, **Contagem** (MG) – *Kontaĵo*, **Divinópolis** (MG) – *Divinopolo*, **Duque de Caxias** (RJ) – *Duke-de-Kaŝio*, **Governador Valadares** (MG) – *Governador-Valadaro*, **Juiz de Fora** (MG) – *Ĵuiz-de-Foro*, **Lavras** (MG) – *Lavro*, **Montes Claros** (MG) – *Montes-Klaro*, **Niterói** (RJ) – *Niterojo*, **Ouro Preto** (MG) – *Oŭro-Preto*, **Pelotas** (RS) – *Peloto*, **Petrópolis** (RJ) – *Petropolo*, **Piracicaba** (SP) –

Pirasikabo, Pocinhos (PB) – Posinjo, Poços de Caldas (aŭ Poços) (MG) – Posos-de-Kaldo (aŭ Poso), Pouso Alegre (MG) – Poŭzo-Alegro, Ribeirão Preto (SP) – Ribejran-Preto, Salinas (MG) – Salino, Santos (SP) – Santo, São Vicente (SP) – San-Visento, Sete Lagoas (MG) – Sete-Lagoo, Três Rios (RJ) – Tres-Rio.

Provu la novajn nomojn

Se vi volas aŭdi la proponatajn nomojn kaj certiĝi, ĉu ili estas bone kompreneblaj se dirataj de neportugallingvano, vi povas uzi la programon Guglo-tradukilo – <http://translate.google.com> – kaj skribi en la maldekstra kadro la esperantigitan nomon. Elektinte la lingvon Esperanto alklaku la butonon de la laŭtparolilo por aŭdi la prononcon. Vi konstatos, malgraŭ la robota voĉo de la programo, ke ĝi estas tre facile komprenebla de kiu ajn brazilano, krom eble pro la akcento. Se vi elektos la portugalan lingvon en la dekstra kadro, vi povos kompari ambaŭ prononcojn alklakante la laŭtparolilon de la dekstra kadro.

Ĉu San-Paŭlio kaj Rio-de-Janejro?

En Brazilo la nomoj **São Paulo** kaj **Rio de Janeiro** estas uzataj kaj por la urboj kaj por la ŝtatoj. Mi ne vidas motivon, kial ili havu malsamajn nomojn en Esperanto. Des pli, ke ili estas uzataj ankaŭ por aliaj geografiaĵoj, kiel kvartaloj, stratoj, avenuoj kaj eĉ ekzistas futbalteamo, kies nomo ankaŭ estas **São Paulo**. Ĉu pro tio en Esperanto ĝi havus alian nomon, ekzemple **San-Paŭlteamo**? Kiam necese, oni aldonu la informojn *ŝtato San-Paŭlo* kaj *urbo San-Paŭlo*. Por la adjektivoj de tiuj nomoj tamen ni havas la formojn **paulista** (por la ŝtato San-Paŭlo), **paulistano** (por la urbo San-Paŭlo) kaj **sãopaulino** (por la futbala teamo). En Esperanto ni povus uzi por la tri *san-paŭla*. Por la responda substantivo, ankaŭ taŭgus *san-paŭlano*, kiun oni povus precizigi per *san-paŭloŝtatano*, *san-paŭlourbano* kaj *san-paŭloteamano*. Simile okazus por Rio-de-Janejro.

Cetere tiu uzo de “-io” estas malrekomendata de la Akademio de Esperanto – https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/index.html –, kiel montras la jena alineo: “Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia “sufikso” aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.”

Rilate la vorton **Amazonas**, mi proponas por la ŝtato la nomon *Amazono*. Por la rivero – temo por alia laboraĵo, kiun mi intencas fari, post la diskuto de ĉi tiu nuna – mi uzus ankaŭ la vorton *Amazono*. Tamen por la regiono nomata portugale **Amazônia**, kiu ampleksas aliajn landojn de Sud-Ameriko, la ĝusta nomo estas *Amazonio*.

Ĉu Brazilo havas ŝtatojn aŭ subŝtatojn?

Kvankam tiu demando ne rilatas al la temo de ĉi tiu laboraĵo, ĝi trudiĝis al mi, kiam mi faris la esploradon.

Ne, Brazilo *ne* havas subŝtatojn. Lastatempe oni pli ofte uzas la vorton *subŝtato* por la federaciaj unuoj de Brazilo, cetere nomataj en la Konstitucio **estados** kaj ne **subestados**. Kvankam en kelkaj okazoj tiu distingo povus esti oportuna mi preferas uzi la vorton *ŝtato* aŭ, se necese, la esprimojn *federacia unuo*, *federacia ŝtato* aŭ *federaciero*. Ne estas tasko de Esperanto ripari la mondon. Se oni volas ŝanĝi tion, oni ŝanĝu unue la konstitucion de la lando, por ke ĝi uzu la vorton **subestado**, tiam oni povos uzi senprobleme en Esperanto la vorton *subŝtato*.

Registro de la nomoj en VTF

Iom post iom la nomoj de ĉiuj municipoj estos registritaj en VTF – *Vortaro Tulio Flores* – <http://vortaro.esperanto.org.br/> –. La tipaj modeloj de la artikoloj en la tri partoj de VTF estas la jenaj, por la municipo **Espinosa** – *Espinozo*:

a) Parto Portugala-Esperanta:

Espinosa (*geogr.: mun. do estado de Minas Gerais*) Espinozo. Vd. *espinosense* ('de Espinosa MG').

espinosense *adj.2g. 1* (*relativo ao mun. de Espinosa MG ou aos seus naturais ou habitantes*) *espinosa*: a cultura *espinosense* é rica la *espinosa* kulturo estas riĉa. • *s.2g. 2* (*o natural ou habitante do mun. de Espinosa MG*) *espinozano*: os *espinosenses* são felizes la *espinozanoj* estas feliĉaj.

b) Parto Esperanta-Portugala:

Espinozo (*geogr.: mun. do estado de Minas Gerais*) Espinosa. Vd. *Minas-Ĵerajso* ('estado'). **espinosa** (*relativo ao mun. Espinozo MG ou aos seus naturais ou habitantes*) *espinosense*: la *espinosa* kulturo estas riĉa a cultura *espinosense* é rica. **espinozano** (*o natural ou habitante do mun. Espinozo MG*) *espinosense*: la *espinozanoj* estas feliĉaj os *espinosenses* são felizes.

c) Parto Esperanta-Esperanta:

Espinozo (*geogr.*) municipo de Brazilo, en la ŝtato *Minas-Ĵerajso*. [etim.: pt *Espinoza*]. **espinosa** rilata al la municipo *Espinozo* MG aŭ al tiu, kiu naskiĝis aŭ loĝas en tiu municipo: la *espinosa* kulturo estas riĉa. **espinozano** tiu, kiu naskiĝis aŭ loĝas en la municipo *Espinozo* MG: la *espinozanoj* estas feliĉaj.

Kiam, kie kaj kiel uzi la esperantigitajn nomojn?

Kompreneble oni uzu la esperantigitajn nomojn en esperantlingva teksto direktita al alilandaj esperantistoj. Se vi skribos leteron per ordinara poŝto aŭ informas vian adreson en iu formularo (ekzemple por aboni revuon, mendi librojn ktp) vi uzu la nacilingvajn formojn, ĉar la mondo ankoraŭ ne scias pri la ekzisto de la Esperantaj nomoj. Tamen kiam vi verkas tekston en Esperanto estas konsilinde ke en la unua apero de la nomo vi uzu la Esperantan nomon tuj sekvatan de interkrampa informo de la nacilingva formo, por ke la leganto povu trovi la urbon en sia nacilingva mapo aŭ per konsulto en interreto.

Kiel skribite en la titolo de ĉi tiu laboraĵo, ĝi estas *propono*, kiun mi prezentas al la brazila esperantistaro, kun kiu mi estas preta diskuti pri la temo. Se ni venos al iu konkludo post tiu diskutado, mi prezentos la rezulton al la Brazila Esperanto-Ligo, por ke ĝi adoptu ĝin kaj fine la *kriterioj* fariĝos *reguloj* kaj ĉi tiu laboraĵo aperos libroforme.

Ĝisdatigitan version de ĉi tiu laboraĵo vi povas elŝuti el jena adreso:

<http://esperanto-mg.com.br/arquivos/esperantigo-tulioflores.pdf>

Mi estas je via dispono per la suba retadreso.

Amike,

Tulio Flores

tulio.flores@uol.com.br

2. KRITERIOJ

1) La vokalsonoj **a, e** (kaj **ae, eux, in, oe**), **i** (kaj **y, ü**), **o** (kaj **eau**) kaj **u** (kaj **ou, w** [= u]) ĝenerale estas transliterataj, krom en la malsupraj okazoj, respektive per *a, e, i, o* kaj *u*. Analoge pri la konsonantoj: **b, d, f, k, l, p, r, t, v, z**.

Itabirito - *Itabirito*

Paraty - *Paratio*

Schroeder - *Ŝredero*

Bayeux - *Bajeo*

Lourdes - *Lurdo*

Engenheiro Paulo de Frontin - *Enĵenjeĵro-Paŭlo-de-Fronteno*

Wall Ferraz - *Ual-Ferazo*

Victor Graeff - *Viktor-Grefo*

RIM.: 1) En unu okazo la sinsekvo **eu** fariĝas *oj*: Morro Reuter - *Moro-Rojtero*. La francdevena sinsekvo **oi** fariĝas *oa*. José Boiteux - *Ĵoze-Boateo*. 2) En du okazoj la nazalaj sonoj de la **u** kaj de la **ui** havas specialan transkribon: Piumhi - *Piumio* kaj Muitos Capões - *Mujntos-Kapojnso*.

2) Sen ŝanĝoj:

Areado - *Areado*

Itabirito - *Itabirito*

Toledo - *Toledo*

Nazareno - *Nazareno*

Sarzedo - *Sarzedo*

Salto - *Salto*

Lagarto - *Lagarto*

RIM.: Kvankam la nomoj estas skribitaj same kiel en la brazilportugala lingvo, ili kompreneble devas esti prononcataj laŭ la Esperanta fonemaro. Tio validas speciale pri la literoj *l* (*Salto*), *r* (*Lagarto*) kaj la vortfina *o* (*Nazareno*), kio donas al la nomoj karakterizan Esperantan akĉenton.

3) Aldono de *-o* al oksitonaj vortoj. Vd. la kriterion 32:

Barueri - *Baruerio*

Itapevi - *Itapevio*

São Luís - *San-Luiso*

Aimorés - *Ajmoreso*

Manaus - *Manaŭso*

Bayeux [bajé] - *Bajeo*

Santos Dumont - *Santos-Dumonto*

4) Ĉe neoksitonaj nomoj, finiĝantaj per vokalo, ŝanĝi tiun vokalon al *-o*. Vd. la kriteriojn 31, 34, 52:

Almenara - *Almenaro*

Lagoa da Canoa - *Lagoa-da-Kanoo*

5) La sinsekvoj **ca, co** (aŭ **cco, ccho**), **cu, cl, cr** fariĝas respektive *ka, ko, ku, kl, kr*. Vortfinaj **-c, -ch** (= k), **-k** kaj **-ck** fariĝas *ko*:

Corinto - *Korinto*
Januário Cicco (Boa Saúde) - *Ĵanuarjo-Siko (Boa-Saudo)*
Marilac - *Marilako*
Selbach - *Selbako*
Mairink (Mairinque) - *Majrinko*
Conselheiro Mairinck - *Konseljeiro-Majrinko*
Graccho Cardoso - *Grako-Kardozo*

6) Ŝanĝo de **ça, ce** (aŭ **sce**), **ci** (aŭ **cy, cci, sci** [= si]), **ço, çu** respektive al *sa, se, si, so, su*:

Açucena - *Asuseno*
Igaracy - *Igarasio*
Sud Mennucci - *Sud-Menuso*
Renascença - *Renasenso*

7) La literoj **m, n** kaj **s** estas ĝenerale transliterataj respektive per *m, n* kaj *s*, escepte de la malsupre montrataj okazoj (kriterioj 19, 24, 63 kaj 77):

Miradouro - *Miradoŭro*
Nazareno - *Nazareno*
Sarzedo - *Sarzedo*

RIM.: La postvokalaj *m* (Campos - *Kampo*) kaj *n* (Santos - *Santo*) ne nazaligu la antaŭajn vokalojn.

8) Ŝanĝo de la finaj **-ônia** kaj **-ônio** al *-onjo*. Se ili aperas en la mezo de la nomo, ili fariĝas *-onja* kaj *-onjo*. Vd. la kriterion 48:

Rondônia - *Rondonjo*
Altônia - *Altonjo*
Barra de Santo Antônio - *Bara-de-Santo-Antonjo*
Colônia Leopoldina - *Kolonja-Leopoldino*

RIM.: La geografia regiono **Amazônia**, tamen, fariĝis *Amazonio*, ĉar ĉi tiu lasta formo jam estas vaste uzata en Esperantujo. La ŝtato-nomo **Amazonas** sekvas la kriterion 22 kaj fariĝas *Amazono*. Ankaŭ la nomo de la riverego estas *Amazono*.

9) Ŝanĝo de la finaj **-ência, -ências, -êncio** al *-ensjo*, kaj de **-ância, -âncio** al *-ansjo*. Se ili estas interne de la vorto, ili fariĝas *-ensja, -ensjas, -ensjo* kaj *-ansja, -ansjo*:

Frei Inocêncio - *Frej-Inosensjo*
Estância - *Estansjo*
Estância Velha - *Estansja-Veljo*
Vicência - *Visensjo*
Venâncio Aires - *Venansjo-Ajro*
Pendências - *Pendensjo*

10) Ĝenerale **s** konserviĝas, krom en intervokala pozicio (kriterio 54) aŭ en vortofinoj (ekz.: **-as, -es** ktp, kriterio 22):

Sarzedo - *Sarzedo*

11) Ŝanĝo de la finaĵo **-óteo** al *-oteo*, kun ŝovo de la akcento al la silabo *te*:

Timóteo - *Timoteo*

12) Ŝanĝo de **j** al *ĵ*. Vd. la kriteriojn 80, 81:

Juramento - *Ĵuramento*

13) Ŝanĝo de **ch**, **sch** kaj **sh** al *ŝ*:

Machado - *Maŝado*

Camacho - *Kamaŝo*

Washington Luís - *Vaŝington-Luiso*

Schroeder - *Ŝredero*

RIM.: Ne ekzistas urbo kun la nomo **Washington Luís**, sed la kriterio jam estas difinita. Vd. la kriterion 99.

14) Ŝanĝo de **rr** al *r*:

Santa Rosa da Serra - *Santa-Roza-da-Sero*

Serrânia - *Seranj*

15) Ŝanĝo de **x** (= *ch*) al *ŝ*:

Araxá - *Araŝao*

16) Ŝanĝo de **x** (= *s*) kaj **z** (= *s*) al *s*:

Extrema - *Estremo*

17) Ŝanĝo de **x** (= *cs*) al *ks*:

São Félix de Minas - *San-Feliks-de-Mino*

18) Ŝanĝo de **nh** al *nj*. Vd la kriterion 30:

Manhuaçu - *Manjuasuo*

Itanhaém - *Itanjaeno*

Sirinhaém - *Sirinjaeno*

19) Ŝanĝo de finaj akcentaj **-am**, **-ém**, **-im**, **-om**, **-um** respektive al *-ano*, *-eno*, *-ino*, *-ono*, *-uno*. Se tiuj sinsekvoj troviĝas interne de la nomo, ili fariĝas *-an*, *-en*, *-in*, *-on*, *-un*:

Baldir - *Baldino*;

Betim - *Betino*;

Bom Jesus da Lapa - *Bon-Ĵezus-da-Lapo*

Passabém - *Pasabeno*

Mutum - *Mutuno*

Capim-Branco - *Kapin-Branko*

Campo Bom - *Kampo-Bono*

Ibiam - *Ibiano*

20) Ŝanĝo de la finaĵoj **-árzea(s)**, **-árzeo(s)** al *-arzeo*, kun ŝovo de la akcento al la antaŭlasta vokalo. Se ĝi troviĝas en la interno de la vorto, ĝi restas *-arzea(s)*, *-arzeo(s)*. Vd. la kriterion 107:

Várzea - *Varzeo*

Careiro da Várzea - *Karejro-da-Varzeo*

Várzea da Palma - *Varzea-da-Palmo (Varzeo)*

Várzea Grande - *Varzea-Grando (Varzeo)*

21) Uzo de dividstreko en nomoj kun pli ol unu vorto.

Rio de Janeiro - *Rio-de-Ĵanejro*

São Paulo - *San-Paŭlo*

Porto Alegre - *Porto-Alegro*
Pouso Alegre - *Pouzo-Alegro*

RIM.: La uzo de la dividstreko estas pli grava en plurelementaj, longaj nomoj. Alie, oni malfacile povus legi ilin. En kelkaj nomoj oni antaŭe kutimis alglui la nomojn (ekz.: *Portalegro, Pouzalegro*) sed tio ŝajnas al mi evitinda, ĉar ĝi rompas la unuecon de la sistemo.

22) Ĉe paroksitonaj kaj proparoksitonaj nomoj kun postakcentaj finaj silaboj, finiĝantaj per **-as, -es** (aŭ **-ens**), **-is, -os, -us** aŭ **-i, -y, -u**, ŝanĝi tiujn finaĵojn al *-o*. Vd. la kriterion 96:

Alfenas - *Alfeno*
Alagoas - *Alagoo*
Breves - *Brevo*
São Fidélis - *San-Fidelo*
Presidente Kennedy - *Prezidente-Kenedo*
Óbidos - *Obido*
Lebon Régis - *Lebon-Reĵo*
Jacaré dos Homens - *Ĵakare-dos-Homo*
Ângelus* - *Anĵelo*

RIM.: 1) El tiu kriterio rezultas, ke oni ŝovos la akcenton de la proparoksitonaj nomoj al la antaŭlasta silabo.

2) * Ne ekzistas municipo kun la nomo **Ângelus**, sed mi aldonis ĝin ĉi tie nur por kompletigi la serion *-as, -es, -is, -os, -us*.

23) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ária, -árias, -ário, -ários** al *-arjo*. Vd. la kriterion 28:

Januária - *Ĵanuarjo*
Campanário - *Kampanarjo*

24) Ŝanĝo de la postakcenta finaĵo **-gem** al *-ĵo*. En la interno de la nomo, ĝi fariĝas *-ĵen*. Vd. la kriterion 81:

Contagem - *Kontaĵo*
Vargem Alegre - *Varĵen-Alegro*
Passagem - *Pasaĵo*
Passagem Franca - *Pasaĵen-Franko*

25) Ŝanĝo de la finaĵo **-ínia** al *-injo*. Vd. la kriterion 27:

Virgínia - *Virĵinjo*
Paulínia - *Paŭlinjo*

26) Ŝanĝo de la finaj **-ória** al *-orjo*. En la interno, al *-orja*. Vd. la kriterion 57:

Vitória - *Vitorjo*
Santa Vitória - *Santa-Vitorjo*
Vitória de Santo Antão - *Vitorja-de-Santo-Antano*

27) Ŝanĝo de la finaĵo **-ínio** al *-injo*. Vd. la kriterion 25:

Patrocínio - *Patrosinjo*
Alumínio - *Aluminjo*

28) Ŝanĝo de la sinsekvo **-ário** al *-arjo*. Vd. la kriterion 23:

Mário Campos - *Marjo-Kampo*

- 29) Ŝanĝo de la finaĵo **-ério, -éria** al *-erjo*:
Dom Silvério - *Don-Silverjo*
Santa Quitéria - *Santa-Kiterjo*
- 30) Ŝanĝo de la finaj **-nha, -nhas, -nho, -nhos** al *-njo* Vd. la kriterion 18:
Brumadinho - *Brumadinjo*
Ourinhos - *Oŭrinjo*
- 31) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ão** kaj **-ãos** al *-ano*. Se **-ão(s)** troviĝas en la interno de la nomo, ĝi fariĝas *-an*. La simpla, fina **-ã** fariĝas *-ano* kaj la nominterna **-ã** – *-an*. Vd. la kriteriojn 50 kaj 68:
Pavão - *Pavano*
Ribeirão Pires - *Ribejran-Piro*
Sertãozinho - *Sertanzinjo*
Dois Irmãos - *Dojs-Irmano*
Dois-Irmãos-das-Missões - *Dojs-Irman-das-Misojnso*
Mairiporã - *Majriporano*
Guarantã do Norte - *Gwarantano-do-Norto*
- 32) Ŝanĝo de la akcentita finaĵo **-ais** al *-ajso*. Vd. la kriterion 3:
Barão de Cocais - *Baran-de-Kokajso*
- 33) Ŝanĝo de la finaĵo **-oni** (pr.: ôni) al *-ono*;
Cristiano Otoni - *Kristiano-Otono*
- 34) Ŝanĝo de la finaĵo **-ões** al *-ojnso*. Se **-õe(s)** troviĝas en la interno de la vorto, ĝi fariĝas *-ojn(s)*. Vd. la kriterion 3:
Perdões - *Perdojnso*
Simões Filho - *Simojns-Filjo*
Pilõezinhos - *Pilojnzinjo*
- 35) Ŝanĝo de la finaj **-lha, -lhas, -lho, -lhos** al *-ljo*. Vd. la kriteriojn 62 kaj 64:
Botelhos - *Boteljo*
Vila Velha - *Vila-Veljo*
- 36) Ŝanĝo de la finaĵo **-lândia** al *-lando*. Se tiu nomparto troviĝas interne de la nomo, ĝi restas *-landja*:
Andrelândia – *Andrelando*
Brasilândia do Sul – *Brazilandja-do-Sulo, Suda Brazilando*
RIM.: Kvankam laŭ la ĝenerala kriterio tiu finaĵo devus esti transskribita per *-landjo*, mi uzas *-lando*, ĉar ĉi tiu finaĵo jam estas uzata en aliaj geografiaj kaj negeografiaj nomoj, kiel Islândia - *Islando*, Esperantolândia - *Esperantolando* kaj Disneylândia - *Disnejlando*.
- 37) Ŝanĝo de la finaĵo **-ases** al *-azo*. Vd. la kriterion 22:
Cataguases - *Katagvazo*
Santana de Cataguases - *Santana-de-Katagvazo*

38) Ŝanĝo de **que(s)** (aŭ **cque[s]**) (= ke[s]), **qui(s)** (= ki[s]) respektive al *ke(s)*, *ki(s)*. Se tiuj silaboj troviĝas en la fino de neoksitonaj vortoj, ili fariĝas *ko*:

Periquito - *Perikito*
Queluzito - *Keluzito*
Cuparaque - *Kuparako*
Senador La Rocque - *Senador-la-Roko*
Brodowski, Brodósqui - *Brodovsko, Brodosko*

39) Ŝanĝo de la finaĵoj -**'polis** aŭ -**'pole** al -*polo*, kun ŝovo de la akcento al la nova antaŭlasta silabo. Vd. la kriterion 52:

Alpinópolis - *Alpinopolo*
Canápolis - *Kanapolo*
Martinópole - *Martinopolo*

40) Ŝanĝo de la finaĵoj -**eira**, -**eiras**, -**eiro**, -**eiros** al -*ejro*:

Medeiros - *Medejro*

41) Ŝanĝo de la finaĵo -**osos** al -*ozo*. Vd. la kriterion 22:

Raposos - *Rapozo*

42) Algluo (aŭ kunfandado) de vortoj. Tio okazus kiam duelementa nomo povus kuniĝi en unu solan vorton, ekzemple, kiam la unua vorto finiĝas per vokalo simila aŭ kunfandebila al la unua vokalo de la dua vorto: Belo Horizonte - *Belorizonto*; Porto Alegre - *Portalegro*; Pouso Alegre - *Poŭzalegro*. Sed mi kredas, ke estas preferinde konservi la vortojn kaj ligi ilin per streketo (*Belo-Horizonto*, *Porto-Alegro*, *Poŭzo-Alegro*). Vd. la kriterion 21.

43) Apudmeto de vortoj. Tio similas al la antaŭa kriterio, sed por nomoj kun pli ol du elementoj (ekz.: Maria da Fé - *Mariadafeo*. Same kiel menciite en la rimarko de la kriterio 21, mi kredas, ke estas preferinde ne uzi tiun kriterion, sed ligi la vortojn per streketo (*Maria-da-Feo*).

44) Ŝanĝo de **sce**, **sci** respektive al *se*, *si*:

Presidente Juscelino - *Prezidente-Ĵuselino*
Juscimeira - *Ĵusimejro*

45) Ŝanĝo de **tsch** al *ĉ*:

Presidente Kubitschek - *Prezidente-Kubiĉeko*

46) Ŝanĝo de **gue**, **gui** respektive al *ge*, *gi*. Vd. la kriteriojn 24, 51, 67, 81:

Piranguinho - *Piranginjo*

47) Ŝanĝo de finaĵoj -**ânia(s)**, -**ânio(s)** al -*anjo*. Interne de la nomo, ĝi restas -*anja(s)* aŭ -*anjo(s)*:

Luziânia - *Luzianjo*
Guimarânia - *Gimaranjo*
Afrânio - *Afranjo*
Betânia do Piauí - *Betanja-do-Piaŭio, Piaŭia Betanjo*

48) Ŝanĝo de finaĵo -**ônio** al -*onjo*. Ĉi tiu kriterio estas unuigita al la kriterio 8.

49) Kvankam la litero **h** ne estas prononcata, ĝi konserviĝas (kaj sekve estas prononcata) se ĝi estas la unua litero de la vorto; en la mezo de vorto ĝi forfalas (escepte se temas pri la duliteraĵoj **ch**, **lh**, **nh** kaj **sh**, la triliteraĵo **sch** kaj la kvarliteraĵo **tsch**). Vd. la kriteriojn 13, 18, 30, 35, 45, 62:

Heliadora - *Heliodoro*
Belo Horizonte - *Belo-Horizonto*
Hortolândia - *Hortolando*
Bahia - *Baio*
Piumhi - *Piumio*

RIM.: En la komenco de mia esploro pri la temo, mi kredis, ke estas pli bone forigi ĉiujn neprononcatajn h-ojn, sed pro insistado de kelkaj esperantistoj, mi ŝanĝis al akcepto nur, kiam la ho estas la komenca litero de la nomo, por ke la aspekto de la nomoj ne tro ŝanĝiĝu.

50) Ŝanĝo de **são** (= santo) al *san-*. Vidu la kriteriojn 31 kaj 68:

São Paulo - *San-Paŭlo*
São Bento Abade - *San-Bento-Abado*

RIM.: Ne konfuzu tiun *san-* kun la Esperanta radiko *san/*. Ĝi estas simple la adapto de la portugallingva vorto **são** al la Esperanta ortografio.

51) Ŝanĝo de **gua**, **gue** (= güe), **gui** (= güi) respektive al *gva*, *gve*, *gvi*. Vd. la kriterion 67:

Aguanil - *Agvanilo*
Birigui - *Birigvio*

RIM.: 1) Bedaŭrinde la 2009-jara Ortografia Akordo de la Portugala Lingvo forigis la tremaon el la supersignoj de la portugala lingvo. Tial de nun oni ne scias, ĉu la nomon Birigui oni prononcu [birigŭi] aŭ [birigi]. La ĝusta prononco estas [birigŭi].

2) La nomo Xinguara, tamen, fariĝas *Singvaro*, ĉar en ĝi la sinsekvo "gua" ne estas diftongo, sed kuniĝo de du apartaj silaboj el la nomoj Xingu kaj Aragvajo (gu + ara).

52) Proparoksitonaj vortoj, same kiel paroksitonaj vortoj finiĝantaj per senakcenta **-ão**, fariĝas paroksitonaj. La plej oftaj okazoj estas tiuj vortoj finiĝantaj per **-polis**, kiuj finiĝos per *-polo*. Vidu la kriteriojn 39 kaj 96:

Petrópolis - *Petropolo*
Teresópolis - *Terezopolo*
Chácara - *Ŝakaro*
Espírito Santo - *Espirito-Santo*
São Cristóvão - *San-Kristovano*
Alcântara - *Alkantaro*

53) Ŝanĝo de **qua** (aŭ **cqua**), **que** (= qüe), **qui** (= qüi) respektive al *kva*, *kve*, *kvi*. Vd. la kriterion 67:

Araraquara - *Ararakvaro*
Passa Quatro - *Pasa-Kvatro*

54) Ŝanĝo de intervokala **s** al **z**, escepte en la okazoj, kiam ĝi, pro iu motivo, konservas sian originan alfabetan sonon:

Espinosa - *Espinozo*
Governador Edison Lobão - *Governador-Edison-Lobano*

55) Ŝanĝo de la finaĵo **-aios** al *-ajo*:
Papagaios - *Papagajo*

56) Ŝanĝo de la finaĵo **-ércia** kaj **-ércio** al *-ersjo*:
Natércia - *Natersjo*
Lupércio - *Lupersjo*

57) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ório**, **-órios** al *-orjo* Vd. la kriterion 26:
Osório - *Ozorjo*
Oratórios - *Oratorjo*

58) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ésia** kaj **-écia** (aŭ **-éscia**) respektive al *-ezjo* kaj *-esjo*. Interne de la nomo, ili restas *-ezja* kaj *-esja*. Vd. la kriteriojn 71, 76, 83:
Carmésia - *Karmezjo*
Nova Venécia - *Nova-Venesjo*
Goianésia do Pará - *Gojanezja-do-Parao, Paraa Gojanezjo*
Nova Bréscia - *Nova-Bresjo*

59) Nomoj kun **Nova(s)** aŭ **Novo(s)**: a) En la komenco aŭ interne de la nomo, ili fariĝas: *Nova(s)* kaj *Novo(s)* respektive. b) En la fino: *Novo*:

Nova Ponte - *Nova-Ponto*
Novo Gama - *Novo-Gamo*
Ponte Nova - *Ponte-Novo*
Divisa Nova - *Diviza-Novo*;
Campos Novos - *Kamos-Novo*
Caldas Novas - *Kaldas-Novo*

RIM.: Ne konfuzu tiujn vortojn kun la Esperanta radikoj *nov*/. Ili estas simple la transskribo de la portugallingvaj vortoj **nova(s)** kaj **novos(s)** al la Esperanta ortografio.

60) Nomoj kun **Santa(s)** aŭ **Santo(s)**: a) En la komenco aŭ interne de la nomo: *Santa(s)* kaj *Santo(s)* respektive. b) En la fino: *Santo*:

Santa Bárbara - *Santa-Barbaro*
Nova Santa Rita - *Nova-Santa-Rito*
Lagoa Santa - *Lagoa-Santo*
Santo André - *Santo-Andreo*
Cabo de Santo Agostinho - *Kabo-de-Santo-Agostinjo*
Monte Santo - *Monte-Santo*
Francisco Santos - *Fransisko-Santo*

61) Ŝanĝo de la nomparto **de Minas** al *-de-Mino* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Minas-Ĵerajso, al la epitetoj *Mina* aŭ *Minas-Ĵerajsa*:

São Félix de Minas - *San-Feliks-de-Mino, Mina San-Felikso*

62) Ŝanĝo de **lh** al *lj*. Vd. la kriterion 35:

Carvalhópolis - *Karvaljopolo*
Vilhena - *Viljeno*

63) Ŝanĝo de la vortoj **dom** kaj **bom** respektive al *don* kaj *bon*. Vd. la kriterion 77:

Bom Despacho - *Bon-Despaŝo*

Dom Cavati - *Don-Kavato*

64) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ília, -ílias, -ilha, -ilhas, -ílio, -ílios, -ilho, -ilhos** al *-iljo*. Interne de la nomo, ili restas *-ilja, iljas, iljo* kaj *iljos*. Vd. la kriteriojn 70, 75:

Brasília de Minas - *Brazilja-de-Mino (Braziljo)*

Treze Tílias - *Treze-Tiljo*

Farroupilha - *Farouĉpiljo*

Maravilhas - *Maraviljo*

Dom Basílio - *Don-Baziljo*

65) Plurelementaj nomoj povas esti esperantigitaj kaj laŭ la plena nomo kaj laŭ mallonga nomo, se tiu estas ofte uzata. Ĝenerale tiun mallongan nomon oni uzas por la loĝanto-nomo:

Abadia dos Dourados - *Abadia-dos-Doŭrado, Abadio* (abadiense - *abadiano*)

66) La duonvokaloj **i** (kelkfoje **e**), **y** fariĝas *j*:

Acaiaca - *Akajako*

Nacip Raydan - *Nasip-Rajdano*

Bayeux - *Bajeo*

Sítio Novo - *Sitjo-Novo*

Trajano de Moraes - *Trajano-de-Morajso*

67) La duonvokalo **u** fariĝas *ŭ*, escepte kiam ĝi venas dekstre de la literoj **g** aŭ **q** kaj estas prononcata (antaŭ la lasta ortografia reformo de la portugala lingvo ĝi estis skribata **ü** (u kun tremao), kiam post ĝi venas **e** aŭ **i**). Pri la sinsekvo **eu** vidu la rimarkon de la kriterio 1. (Vd. ankaŭ 46, 51 kaj 53):

Augusto de Lima - *Aŭgusto-de-Limo*

Ouro Preto - *Oŭro-Preto*

68) Ŝanĝo de la akcentaj finaĵoj **-ã** kaj **-ãs** al **-ano** kaj **anso**, respektive. En la interno de la nomo, ili fariĝas **-an** kaj **-ans**, respektive. Vd. la kriteriojn 31 kaj 50:

Canaã - *Kanaano*

Olho d'Água das Cunhãs - *Oljo-Dagva-das-Kunjanso*

Nova Canaã Paulista - *Nova-Kanaan-Paŭlisto*

69) Ŝanĝo de la finaĵoj **-eia, -eias, -eio, -eios** al **-ejo**:

Areia - *Arejo*

Campo do Meio - *Kampo-do-Mejo*

Candeias - *Kandejo*

Brasileia - *Brazilejo*

70) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ólio** kaj **-ópio** respektive al **-oljo** kaj **-opjo**. Vd. la kriteriojn 64, 75:

Capitório - *Kapitoljo*

Cornélio Procópio - *Korneljo-Prokopjo*

71) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ássia, -ácia, -ácio** al **-asjo**. Vidu la kriteriojn 58, 76, 83:

Cássia - *Kasjo*

São Bonifácio - *San-Bonifasjo*
Palmácia - *Palmasjo*

72) Nomoj kun “**do Norte**”, “**do Sul**”, “**do Oeste**” (“**d’Oeste**”), “**do Oriente**” (“**do Leste**”), “**do Sudoeste**” fariĝas respektive *Norda*, *Suda*, *Okcidenta*, *Orienta*, *Sudokcidenta* aŭ povas sekvi la ĝeneralajn regulojn, kaj ricevi “*-do-Norto*”, “*-do-Sulo*”, “*-do-Oesto*” (aŭ “*Doesto*”), “*-do-Oriente*”, “*-do-Lesto*”, “*-do-Sudoeste*”:
Chapada do Norte - *Norda Ŝapado*, *Ŝapada-do-Norto*

73) Ŝanĝo de la finaĵoj **-áudio(s)** kaj **-áudia(s)** al *-aŭdjo*:
Cláudio - *Klaŭdjo*
Cláudia - *Klaŭdjo*

74) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ãe** kaj **-ães** al *-ajno* kaj *-ajnso*, respektive. En la interno de la vorto, ili fariĝas *-ajn* kaj *-ajns*:
Guanhães - *Gvanjajnso*
Mãe-d’Água - *Majn-Dagvo*
Magalhães de Almeida - *Magaljajns-de-Almejdo*

75) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ália** kaj **-élio** (aŭ **-élia**) respektive al *-aljo* kaj *-eljo*. Vd. la kriteriojn 64, 70:
Cristália - *Kristaljo*
Cornélio Procópio - *Korneljo-Prokopjo*
Lucélia - *Luseljo*

76) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ísia**, **-ísio** al *-izjo*. Vd. la kriteriojn 58, 71, 83:
Nísia Floresta - *Nizjo*, *Nizja-Floresto*
Dionísio - *Dionizjo*

77) Ŝanĝo de **dom** al *don-*. Vd. la kriterion 63:
Dom Bosco - *Don-Bosko*

78) Ŝanĝo de la finaĵo **-ati** (pr.: *áti*) al *-ato*:
Dom Cavati - *Don-Kavato*

79) Ŝanĝo de la finaĵo **-ébia** al *-ebjo*:
Dona Euzébia - *Dona-Eŭzebjo*

80) Ŝanĝo de **ja**, **je**, **ji**, **jo**, **ju** respektive al *ĵa*, *ĵe*, *ĵi*, *ĵo*, *ĵu*. Vd. la kriteriojn 12, 81:
Araújo - *Araŭjo*

81) Ŝanĝo de **ge**, **gi** respektive al *ĵe*, *ĵi*. Vd. la kriteriojn 46, 24, 80:
Argirita - *Arĵirito*

82) Ŝanĝo de **ew** al *eŭ*:
Ewbank da Câmara - *Eŭbank-da-Kamaro*

83) Ŝanĝo de **-ício** al *-isjo*. Vidu la kriteriojn 58, 71, 76:
Felício dos Santos - *Felisjo-dos-Santo*

- 84) Ŝanĝo de **ss** al **s**:
 Bom Sucesso - *Bon-Suseso*
 Cássia - *Kasjo*
 Lassance - *Lasanso*
 Passa Quatro - *Pasa-Kvatro*
- 85) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ímpia, -ímpias, -ímpio, -ímpios** al *-impjo*. Se ili troviĝas en la interno de la nomo, ili fariĝas *-impja(s)* kaj *impjo(s)*:
 Olímpio Noronha - *Olimpjo-Noronjo*
 Olímpia - *Olimpjo*
- 86) Ŝanĝo de la finaĵo **-úrio** al *-urjo*:
 Santa Bárbara do Tugúrio - *Santa-Barbara-do-Tugurjo*
- 87) Ŝanĝo de la finaĵo **-ênia** al *-enjo*:
 Santa Efigênia de Minas - *Santa-Efîjenjo (Santa-Efîjenja-de-Mino)*
- 88) Ŝanĝo de la finaĵo **-ix** (prononcata [ics]) al *-ikso*, kun ŝovo de la akcento al la “i”:
 São Félix (BA) - *San-Felikso*
 Fênix (PR) - *Fenikso*
 São Félix de Minas - *San-Feliks-de-Mino (San-Felikso)*
- 89) Ŝanĝo de la finaĵoj **-édia, -édias, -édio, -édios** al *-edjo*; **-ídia, -ídias, -ídio, -ídios** al *-idjo* kaj **-ódia, -ódias, -ódio, ódios** al *-odjo*:
 Senhora dos Remédios - *Senjora-dos-Remedjo*
 Custódia - *Kustodjo*
 Manoel Emídio - *Manoel-Emidjo*
- 90) Ŝanĝo de **w** (= v) al **v**. Vd. la kriterion 99:
 Wenceslau Braz - *Venseslaŭ-Brazo*
 Brodowski - *Brodovsko*
- 91) Kunscribo de la sufiksoj **-guaçu, -açu, -mirim, -miri**:
 Mogi Guaçu (Mojiguaçu) - *Mojigvasuo*
 Mogi Mirim (Mojimirim) - *Mojimirino*
 Igarapé-Miri (Igarapemiri) - *Igarapemirio*
 Tomé-Açu - *Tomeasuo*
- 92) Nomoj kun apostrofoj (escepte se temas pri vortoj montrantaj direktojn, kiel “d’Oeste” - kriterio 72) estas rigardataj senapostrofoj: “Sant’Ana” = “Santana”, “d’Ajuda” = “Dajuda”.
 Sant’ana do Livramento - *Santana-do-Livramento*
 Itaporanga d’Ajuda - *Itaporanga-Dajudo*
- 93) Ŝanĝo de la nomparto **Paulista** al *Paŭlisto* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato San-Paŭlo, al la epiteto *San-Paŭla*:
 Várzea Paulista - *Varzea-Paŭlisto* aŭ *San-Paŭla Varzeo*.
- 94) Ŝanĝo de la nomparto **do Maranhão** al *do-Maranjano* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Maranhano, al la epiteto *Maranjana*:

São Mateus do Maranhão - *San-Mateŭs-do-Maranjano, Maranjana San-Mateŭso*

RIM.: En Minas-Ĵerajso ekzistas urbo nomata **São Sebastião do Maranhão**, en kiu la vorto “Maranhão” ne signifas, ke la urbo apartenas al la ŝtato Maranjano; sekve, tiu urbo havu la nomon *San-Sebastian-do-Maranjano* (aŭ mallonge *San-Sebastiano*).

95) Ŝanĝo de la nomparto **do Tocantins** al *do-Tokantins*o aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Tokantins, al la epiteto *Tokantinsa*:

Paraíso do Tocantins - *Paraizo-do-Tokantins*o aŭ *Tokantinsa Paraizo*

96) Neoksitonaj nomoj finiĝantaj per konsonantoj aliaj ol **s** ricevas la finaĵon **-o** kaj la akcento ŝoviĝas al la nova antaŭlasta silabo. Vd. la kriterion 22:

Wagner - *Vagnero*

Alfredo Wagner - *Alfredo-Vagnero*

Lauro Müller - *Laŭro-Milero*

Frederico Westphalen - *Frederiko-Vestfaleno*

São Félix - *San-Felikso*

97) La finaĵoj **-índio** kaj **-índios** fariĝas *-indjo*:

Palmeira dos Índios - *Palmejra-dos-Indjo*

Cachoeira dos Índios - *Kaŝoejra-dos-Indjo*

98) Ŝanĝo de la nomparto **do Paraná** al *do-Paranao* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Paranao, al la epiteto *Paranaa*:

Tunas do Paraná - *Tunas-do-Paranao, Paranaa Tuno*

99) Ŝanĝo de la komenca **w** (= ŭ) al *v*. Vd. la kriterion 90:

Washington Luís - *Vaŝington-Luiso*

RIM.: Ne ekzistas urbo kun la nomo **Washington Luís**, sed la kriterio jam estas difinita. Vd. la kriterion 13.

100) Ŝanĝo de la nomparto **do Piauí** al *-do-Piaŭio* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Piaŭio, al la epiteto *Piaŭia*:

Lagoa do Piauí - *Lagoa-do-Piaŭio, Piaŭia Lagoa*

101) Ŝanĝo de la nomparto **do Pará** al *-do-Parao* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Parao, al la epiteto *Paraa*:

Santa Isabel do Pará - *Santa-Izabel-do-Parao, Paraa Santa-Izabelo*

RIM.: En Minas-Ĵerajso ekzistas du urboj nomataj **São Gonçalo do Pará** kaj **Conceição do Pará**, en kies nomoj la vorto “Pará” ne signifas, ke la urbo apartenas al la ŝtato Parao; sekve, tiuj urboj havu la nomon *San-Sebastian-do-Maranjano* (aŭ mallonge *San-Sebastiano*) kaj *Konsejsan-do-Parao* (aŭ mallonge *Konsejsano*). Fakte, ĝi rilatas al la rivero Parao, kiu fluas proksime de tiuj du urboj.

102) Ŝanĝo de la nomparto **de Goiás** al *-de-Gojaso* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Gojaso, al la epiteto *Gojasa*:

Águas Lindas de Goiás - *Agvas-Lindas-de-Gojaso, Gojasa Agvas-Lindo*

Valparaíso de Goiás - *Valparaizo-de-Gojaso, Gojasa Valparaizo*

103) Duoblaj konsonantoj, kiuj estas prononcataj kiel unu, ŝanĝiĝas al unuopaj konsonantoj:

Joinville - *Ĵojnvilo*

Presidente Castello Branco - *Prezidente-Kastelo-Branko*

Presidente Kennedy - *Prezidente-Kenedo*

104) Ŝanĝo de la nomparto **do Ceará** al *-do-Searao* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Searao, al la epiteto *Searaa*:

Viçosa do Ceará - *Visoza-do-Searao, Searaa Visozo.*

105) Ŝanĝo de la finaĵo **-ádua** al *-advo*:

Santo Antônio de Pádua - *Santo-Antonjo de-Padvo*

Nova Pádua - *Nova-Padvo*

106) Ŝanĝo de **ph** (= f) al *f*:

Frederico Westphalen - *Frederiko-Vestfaleno*

107) Ŝanĝo de la finaĵoj **-ânea(s)**, **-âneo(s)** al *-aneo*, kun ŝovo de la akcento al la antaŭlasta vokalo. Se ĝi troviĝas en la interno de la vorto, ĝi restas *-anea(s)*, *-aneo(s)*. Vd. la kriterion 20:

Solânea - *Solaneo*

Cipotânea - *Sipotaneo*

108) Nomoj enhavantaj ciferojn estas esperantigitaj laŭ la vortigo de la ciferoj:

Pedro II (= segundo) - *Pedro-Segundo*

Pio XII (= doze) - *Pio-Dozo*

Pio IX (= nono) - *Pio-Nono*

109) Ŝanĝo de la nomparto **de Sergipe** al *-de-Serĵipo* aŭ, se ĝi rilatas al la ŝtato Serĵipo, al la epiteto *Serĵipa*:

Monte Alegre de Sergipe - *Monte-Alegre-de-Serĵipo, Serĵipa Monte-Alegro*

